

S.F.E.L.O.
Groupe Esperanto
Foyer International
93, Bd S-Michel, Paris-5^e



Kulturaj Kajeroj

E. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

J A R A B O N O :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj / 13, boulevard de la Chauvinière

Bonfara : 12 fkoj / 44 - Nantes

P.C.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

1967

6

KULTURAJ KAJEROJ

1967

NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Pri Gresillon

Noktpromeno al dolmeno

Dakapo

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

En la tempo de la sklavkomerco

Por aŭ kontraŭ la reklamo

Gravaj datrevenoj

Misteraj revelacioj de la granda piramido

Abato Moreux (trad. C. Bourlet).

Kion ankoraŭ

Imri Sarkadi (trad. L. Tihanyi)

Por via distro

Nia Konkurso

P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

*Kulturaj Kajeroj deziras al siaj geamikoj
cion bonan por la ĵuskomenciĝanta jaro.*

PRI GRÉSILLON

Noktpromeno al dolmeno

Vendredvespere mi estis gvidonta la programon en la kastelo. Kun sekretario kaj kasistino ni jam priparolis la programojn, sed la bela vetero kaj antaŭvidebla hela lunnokto kruele nuligis niajn planojn pri la vesperprezentoj. Kompreneble mi iom ĉagrenis pro tio. Je la naŭa mi fuĝis. Mi eniris la koridoran vojeton laŭlonge de la baneja rivereto. Finfine mi atingis flankvojeton. Mi iris maldekstren kaj klopodis trovi vojeton kondukantan al la fervojo, sed en tio mi ne sukcesis: la elektita vojo kondukis paralele returnen al la kastelo. Subite mi staris denove sur la herbejo inter la banejo kaj volebalejo.

Dum tiu soleca promonado la ĉagreno malaperis kaj mi decidis sekvi la grandan grupon, kiu jam foriris al la dolmeno. Mi estis la lasta, kiu transiris la barilon por rapide atingi la fervojon. Flanke de kaj inter la reloj la grupo antaŭeniĝis. La irado ne estis rapida, sekve mi baldaŭ atingis la antaŭan vicon; tamen ducent metrojn pliantaŭe jam iris kelkaj gejunuloj portante lampojn. Ankaŭ ilin mi pretermarŝis, ĉar instigis min la deziro retrovi la vojon al la dolmeno unua kaj sen helpo de lampo. Kiam la unua vico de la grupo alvenis, mi staris apud la dolmeno kaj per huhuado mi salutis ilin. Ni surgrimpis la dolmenon kaj ankaŭ baldaŭ sekvis la tuta grupo. Kelkaj restis por fari fotojn. Post la fotografado, sidante supre sur la dolmeno, ni kune kantis sub gvidado de F-ino Tomialoĵe. La geedza paro el Polio kantis pollingve dormkanton. Kelkaj rakontis anekdoton, kaj ni daŭrigis la kantadon ĝis kiam Sro Fort montris al ni fantomon.

En lunlumo ni ludis apud la dolmeno la ludon « Signalo ». Starante cirkle ni formis ringon

ligita kaj taŭga por transdoni manpreman signalon. La gvidanto de la ludo, estis la signalisto. Du el la ludantoj estis sonorigistoj, ili aŭdigis: RRINRIN, kiam ili estis manpremitaj. Unu ludanto (divenisto) en la mezo de la rondo devas diveni la personon, kiu ĵus ricevis manpreman signalon, sed tio ne estas facila, ĉar la manoj surdorasaj ne estas videblaj por la divenisto, krome la signalisto povas sendi la signalon aŭ dekstren aŭ maldekstren. La signalisto devas anonci la alvenon de signalo, kiu rondiris, kaj anonci la foriron denove. Lerta divenisto, atentante la sonorilojn, baldaŭ sukcesas montri ĵus signalinton. Ĉi lasta fariĝas divenisto, dum la ekسدivenisto okupas lian lokon en la ringo. Tre agrabla ludo, certe en tiu heliuna nokto. Kiel finon, ni faris alian ludon. Tri geknaboj devis kaŝi sin ie en la arbaro. Alia grupo de gejunuloj devis kvazaŭserĉi la triopon. Ili faris tion per multege da bruoj. Huhuadis kaj batis per branĉoj sur teron kaj sur arbojn. Anstataŭ alproksimiĝi al la serĉotoj, ili iom post iom sekvis la grupon kiu reen ekiris al la kastelo. Nur la gvidanto de la ludo restis (kaj mi). Ni kaŝis nin ĝis kiam estis tute silente en la arbaro. Tiam ni komencis fajfi kiel birdo.

Rimarkinte, ke la grupo foriris sen ili, la triopo forlasis sian kaŝejojn kaj klopodis trovi nin. Kvankam ni ĉesigis la faŭfadon ili sukcesis trovi nin kaj kvinope, kiel lastaj forlasis la dolmenan arbaron. Estis mi la lasta, kiu saltis trans la barilon apud la kastelo kun vera ĝojo pro la partopreno al tiu mirinda noktpromonado.

DAKAO
aŭgusto 1967a

Esperanto tra la Mondo



La programo de la esperanto-manifestacioj, por 1968, estas jam parte planita. Notu jam :

— 53a Universala Kongreso de Esperanto, en Madrid, 3-10 de aŭgusto (konstanta adreso, en U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando). Postkongreso en Zaragoza.

— Internacia Junulara Kongreso : en Taragona (Hispanujo) je fiksota dato, en ligo kun la universala kongreso.

— Internacia kongreso de S.A.T., 3-9 de aŭgusto, en Utrecht (Nederlando). Adreso : Sro J. Ph. Punt, Kenastr. 35, Utrecht 3.

— Unua komuna kongreso de I.K.U.E. kaj K.E.L.I. (katolikoj kaj protestantoj) 25-7, 1-8, en Limburg/Lahn, Germanujo. Adreso : Esperanto kongreso, D 625 Limburg/L. Markstr. 27.

— Kongreso de STELO (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) 16-23 de aŭgusto, en Aix-en-Provence, Francujo. Adreso : Studenta Esperantista Rondo, 28, rue Portalis, 13 Aix-en-Provence.

— Internacia kongreso de la fervojistoj, 11-17 de Majo, en Varna, Bulgario.

— Skisemajno en Innsbruck, Aŭstrujo, 10-17 de Februaro. Adreso : Sro J. Geroldinger, Marcusgang 7, A-4020, Linz.

— ... kaj de nun, pripensu ĉeesti en Grésillon, agraĵblajn renkontojn.

Ei Finnlando :

— Sub la gvido de Vilho Setälä, membro de la Akademio de Esperanto, komenciĝis je la 2a de oktobro 1967 du oficialaj kursoj de Esperanto — unu elementa, la alia supera, en la Universitato de Helsinko, la plej granda universitato de Finnlando, laŭ lastempa decido de la universitataj aŭtoritatoj. Laŭ dokumento ĵus eldonita de la Centro de Esp'oro kaj Dokumentado de Universala Esperanto-Asocio, en la periodo 1965-66 estis minimume 16 universitatoj en la mondo, en kiuj troviĝis oficialaj kursoj, lektoradoj aŭ katedroj de Esperanto.

Ei Italio :

— La granda firmao Fiat eldonis kvaran propagandilon en Esperanto. Ĝi estas titolita : « Ĝi nomiĝas Fiat 125 ».

Ni forte sugestas al la esperanto-kluboj peti pokvanke la jam eldonitajn propagandilojn de Fiat, skribante al : « Direzione stampa e propaganda, Corso Marconi 10, 10100 Torino, Italujo.

Ei Ĉeĥoslovakio :

— Por la dua fojo, la Ĉeĥoslovaka ministaro de poŝto uzas esperanton por filatela emisio, okaze de tutmonda ekspozicio de poŝtmarkoj : poŝtmarko de serio, kiu reklamas pri tiu ekspozicio estas vendata kun esperantlingva teksto sur la folieta margeno.

Tradukoj :

— Dokumentoj ĵus eldonita de la Centro de Esp'oro kaj Dokumentado listigas laŭlande 60 tradukojn en la internacian lingvon eldonitajn dum 1966 en 14 landoj. La dokumento estas kontribuo al la monda listo de tradukoj Index translatorum ĉiujare eldonita de Unesko.

— La vjetnama rakontaro « Meze de l'flamoj » aperis en la japana lingvo, tradukita el la esperanto-eldono. En 1965 aperis, same tradukita la romano « Franjo Tu Haŭ ». Ĝis nun, ambaŭ japanaj eldonoj vendiĝis en kvanto de pli ol 10.000 ekz.

— « Pri arto kaj morto », originala novelaro de Miyamoto Masao pri la vivo kaj morto de kelkaj famaj japanaj beletristoj kaj artistoj.

— « Historio de la mondlingvo ». Temas pri reeldono de la delonge elĉerpita verko (eldonita en 1931), de la sovetano E. Drezen.

— Plena esperanto-juda vortaro kaj plena juda-esperanto vortaro, de Harry Fineman.

— « Fortoj de l'vivo », verkaro de la konata finnlandano Vilho Setälä.

Korespondado :

— Fondiĝis korespondada servo de junaj sovetaj esperantistoj, Skri bu eventuale al la estro : Kazancev Leo, p.k. 10, Ivanovo-centr. U.S.S.R.

— U.E.A. estis akceptita kiel membro de F.I.O.C.E.S. (internacia federacio de organizoj por lernejoj korespondado kaj interŝanĝoj). Oni povas pri tio rilati kun Sro Jozef Toczyski, estraro de U.E.A. pri lernejoj, Skr. p. 57, Gdansk, Pollando.

— Ni denove ankaŭ atentigas niajn legantojn pri la esperanto organizado : « Grajnoj en Venio » 66, rue des Pins, Ch 2.500 Bienne/Biel 7, Svislando, kiu zorgas pri interŝanĝoj de esperantlingvaj gazetoj, aranĝitaj de la infanoj mem.

EN LA TEMPO DE...

LA SKLAVKOMERCO

El la francaj havenurboj, kiuj famigis pro sklavkomerco dum la XVIIIa jarcento, Nantes, ĉe la elfluejo de la rivero Loire, estis certe la plej fama.


En tiu tempo Francio posedis plurajn koloniojn en la Antiloj : Gvadelupon, Martinikon, San-Domingon kaj multajn aliajn insulojn. En tiujn insulojn oni enkondukis la kultivadon de kafo, kakao, diversaj citrusoj kaj de la « Herbo de Kanarioj », la sukerkano. La nantaj negocistoj antaŭvidis la profiton tireblan el tiuj insuloj. Sed tiuj kultivadoj postulis multnombran manlaboron. La volontuloj estis maloftaj, kvankam la reĝa registaro multe propagandis. Kvindektaga navigado kaj danĝero de disenterio kaj skorbuta ne estis tre allogaj. Tiam estis organizita rekrutigon de pli malpli konsentaj aventuruloj : vaguloj, ĉiesulinoj, eĉ kelkfoje, honestaj servistinoj, burĝinoj erare enŝipigitaj. Ili estis laborontaj kvazaŭ sklavoj profite al la jam instalitaj kolonianoj dum tri jaroj !

Jam en la XVIa jarcento, la Hispanoj, poste la Portugaloj, la Angloj, la Francoj, la Danoj, la Nederlandanoj laborigis nigrajn sklavojn en siaj Amerikaj kolonioj. En 1713 la franca registaro decidis, ke la sklavkomerco estas libera kondiĉe ke la sklavŝipoj estu armitaj en Rouen, la Rochelle, Bordeaux, Saint-Malo kaj Nantes. De tiu tempo Danton riĉiĝis : la nantaj negocistoj faris la nautes de la tuta franca sklavkomerco.

Ni sekvu unu el tiuj ŝipoj. Antaŭ la foriro oni enŝipigas varojn kiuj utilos en Afriko interŝanĝe de homoj. Jen listo de tiuj varoj : arĝent-ĉenoj, ambro, ringoj, lanŝtrumpoj, butonoj, pendseruroj, ĉemizoj, kristalaĵoj (plej ofte imitaĵoj), skarlata drapo, brando, pafiloj, tintiloj, tolo, speguloj, papero, pantofloj, pulvo, ktp... Oni enpakas tiujn varojn en « paketoj » kaj « pakegoj ». Oni enŝipigas ankaŭ nutraĵojn : farunon, biskvitojn, peklitan lardon kaj bovaĵon, sekajn legomojn, akvon, vinon, brandon, kaj

por la komenco de la vojaĝo : kortobirdojn, malgrandajn brutojn ; por la nigruloj, grion, milion, rizon oni aĉetos en Afriko. Sur la ŝipo staras du — aŭ trioble pli da kanonoj ol sur ordinara ŝipo, ĉar la Atlantiko estas frekventata de malbonuloj kaj ŝippleno da sklavoj estas valorega kaptajo !

Post du aŭ tri monatoj, la ŝipo alvenas al la Afrika bordo. Malrapide ĝi laŭiras la bordon. La plej bona « ĉas-tereno » estas la Ora Bordo kaj Benino.



El la vojaĝlibro de iu ŝipestro ni citos la jenajn tre elvokivajn liniojn :

« 4an de majo 1750 : hodiaŭ mi pritraktis kvar kaptitojn, kvar inojn, kiuj kostis du cent tridek kvin pakegojn.

Ian de majo 1750 : Reĝo Pitre, kiu estas absoluta fripono, kiun oni deŝas malfidi, prenis, kiel garantiulojn, oficiron kaj la ĉefĉarpentiston, pro nepago de boat-luado fare de alia ŝipestro. Li liberigis ilin kontraŭ pago de sesdek pakegoj ».

La rilatoj inter estroj de sklavŝipoj kaj afrikaj reĝoj ne estis plenfidaj. Pro tio la kompanioj preferis « komerci » kun kontoroj : la ŝipestroj proviziĝis ĉe grandaj staploj en kiuj estis enŝlositaj la sklavoj.

Oni amasigas kiel eble plej grandan nombron da kaptitoj. Tiu ĉi sidas aŭ kuŝas unu apud la alia, katenitaj, ricevante freŝan aeron nur tra la ferdekpordoj. Unu foje en la tago ili rajtas « promeni » sur la ferdeko. Multaj el ili mortas dum la vojaĝo pro epidemioj. Ankaŭ ŝipanoj mortas. La nigruloj mortas ĉefe ĉe la komenco de la vojaĝo : ribeloj, kolektivaj sinmortigoj, malsanoj. Oni povas legi sur tiama vojaĝolibro de ŝipestro : « mortis nigrulino, kvazaŭ freneza : ŝi ne volis manĝi ; mortis ankaŭ nigrulo pro langvoro ». Pro tio iu Jacques Savary skribis en 1757, ke : « estas dezirinde, por konservi la nigrulojn, havi sur la ŝipo personojn, kiuj povas ludi per violono, violo, sakfajlo, por ke ili restu gajaj dum la vojaĝo ».


Post unu aŭ du monatoj la sklavŝipo forlasas Afrikon, veturigante sian ŝarĝon al la Antiloj. Dumonata marveturo. Martiniko akceptas multajn sklavojn. Sed post 1735 San-Domingo fariĝas la plej grava merkato de la nantaj negocistoj.

Alveninte la ŝipestro renkontas multajn administrajn ĉikanajojn. Sed la disdonado de kelkaj koruptaĵoj glatigas la vojon. La guberniestro elprenas sian parton kaj la kaptitoj estas vendataj. Oni ilin vestas kaj nutros tiamaniere, ke ili pli bone prezentigos antaŭ la aĉetantoj.

Ankaŭ per interŝanĝo oni vendas la sklavojn. La ŝipo revenas Francion, plena je nerafinita sukero, kafo, kotono, tabako, indigo. La plantejmastroj preferus mem rafini la sukeron, sed ĉio estas transformota en Francio. En sesdek jaroj Nantes registras la revenon de sepcent okdek sep sklavŝipoj, preskaŭ la duonon de la tuta franca sklavkomerco. En 1794 la Konvencio unuanime voĉdonas

kontraŭ sklavigon sed la sklavkomerco kostis cent aŭ cent kvindek milionojn da loĝantoj al Afriko.

Dank'al tiu komerco Nantes multe riĉiĝis kaj la aspekto de la urbo ŝanĝiĝis. Arkitektetoj venis. En la strato Kervegan oni ankoraŭ nun povas vidi tiam konstruitajn luksajn domojn kaj ankaŭ sur la Quai de la Fosse. Fine de la XVIIIa jarcento, la remparoj estis nivelitaj kaj la rivero Erdre kanaligita. La kajoj estis renkonstruitaj, kaj ankaŭ vastaj korsoj, placoj kaj la nuna Prefektejo. Tutaj kvartaloj transformiĝis. Ne nur en la urbo konstruiĝis luksaj domoj, sed ankaŭ en la apuda kamparo. Tie sur la kvietaj bordoj de la riveroj Erdre, Sèvre, Loire ankoraŭ



nun staras kasteletoj kun belaj parkoj, terasoj, ĝardenoj. El Ameriko oni alportis novajn plantojn : begoniojn, magnoliojn. La internoj estas riĉaj. Famekonataj pentristoj dekoraciis ilin. Oni ornamis ilin per ekzotikaj bagatelaĵoj. Car ili preskaŭ ĉiuj estas ankoraŭ loĝataj, oni ne povas ilin viziti. Sed ilia eksteraĵo estas nepre vidinda.

Nantes estas urbo riĉa je vizitindaj monumentoj, parte dank'al tiuj sklavkomercistoj, kiuj tamen estis artamantoj. Iuj povas opinii tion ĝena. Sed ĉu multaj el la plej admirindaj monumentoj en la mondo ne kreskis el la sango kaj ŝvito de malfeliĉegaj homoj ?

POR AŬ KONTRAŬ

La Reklamo

Ĉiuj scias, ke la vivmaniero de la okcidenta homo multe ŝanĝiĝis dum la lasta duonjarcento, grandparte pro reklamo. Tiu fenomeno estas eble tro nova por ke li konscie perceptu ĝin. Li plej ofte ne konscias, ke lia konduto, lia libera volo, liaj elektoj parte dependas nun de la reklamo.

En la modernaj landoj, la jara reklam-buĝeto pli kaj pli ampleksiĝas, pli rapide ol la naciaj enspezoj. Fakte, la nuntempa ekonomia strukturo estas prilaborita rilate « filozofion » de vendarto. La tuta nuntempa ekonomio estas koncernita. Iuj ekonomiistoj parolas pri « ekonomio de abundo », aliaj pri « ekonomio de malŝparado ».

La defendantoj de reklamo diras, ke, ĉar ĝi ebligas la informigon de miloj da aĉetantoj, ĝi ankaŭ ebligas la amasan disvendadon de la produktaĵoj kaj konsekvence amasan produktadon kaj malaltigon de la plenkosto. La konsumantoj aĉetas je pli malaltaj prezoj. La produktantoj, firmestroj kaj laboristoj, pli produktas, kaj ne timas misvendon kaj senlaborecon. Plie kelkaj profesioj utilaj sur praktika aŭ kultura tereno riĉiĝas kaj liberigiĝas je kelkaj « bremsoj ». La reklam-enspezoj de gazeto estas tre grandaj, pli grandaj ol la vendo-enspezoj. Gazetoj kaj revuoj tre ofte vendiĝas je prezo pli malalta ol la plenkosto. Dank'al la nereкта helpo de reklamo, la nombro de mondonaj gazetoj kaj revuoj estas pli granda kaj ankaŭ la eldonkvanto.

Aliaj profitantoj estas la grafikistoj. Dum jarcentoj, grafikistoj estis nur malmul-

taj. Nun estas miloj da grafikistoj ĉar ne plu temas pri ilustrado de poemoj sed pri trudo de produktaĵoj, knedado de la nekonscio de la homamaso per afiŝoj kaj sloganoj.

Aliaj ekonomiistoj kontraŭbatalas tiujn argumentojn. Ili diras ke unu el la ĉefaj karakteroj de tiu « ekonomio de malŝparado », ido de reklamo estas la enkonduko de modo en ĉiujn aktivajojn. Kiel virino ŝanĝas sian robon ne pro bezono sed pro obeo al nova modo, tiel la moderna aĉetanto ŝanĝas sian aŭtomobilon, sian frigorŝrankon ĉar ĝi ne plu estas laŭmoda. Konsekvence, cele al grandskala vendado oni agas tiamaniere, ke ĉio rapide eksmodiĝas. Tre ofte ne la tekniko sed la aspekto ŝanĝiĝas. Ĉiujare la studoficejoj de la grandaj firmaoj difinas la novan belo-kriterion kaj samtempe preparas la sekvantajn stilon, kiu aspektigos la ĉiujaran abomeninda. Ankaŭ la grafikistoj obeas tiujn nedaŭrajn stilojn. Ĉu veraj artistoj povas ĉiam ŝanĝi sian stilon? Iu direktoro de reklam-agentejo diras, ke post kelkaj jaroj liaj ĉefaj kunlaborantoj estas « eluzitaj ». Reklamo fakte fondis grafikon, kiu detruas la esencon de arto : konstantecon.

Ĉiu reklamisto estas devigata favori la gazetojn kaj revuojn, kies eldonkvanto estas granda por atingi, kiel eble plej multe da homoj pere de kiel eble plej malmulte da presajoj. La gazetoj kaj revuoj, kies eldonkvanto ne estas sufiĉe granda estas devigataj altiĝi la vendoprezon kaj, krom kelkaj esceptoj, iom post iom malaperi. Alia flanko de tiu afero estas la sendependeco de la gaze-

toj. Tiuj ĉi pli malpli dependas de la reklamistoj. Plie, ĉar la nombro de la gazetoj kaj revuoj malpliigis, la prezo de reklamo multe altiĝis. La mezgrandaj entreprenoj ne plu povas reklami kaj iom post iom malaperas aŭ estas devigataj kunfandi kun grandaj entreprenoj.

Ne plu estas eble vendi produktaĵojn sen reklam-kampanio. La pli multo el la vendistoj rifuzas produktaĵojn ne subtenitajn de reklamado. Tiamaniere ili fariĝas pli distribuistoj ol vendistoj, kaj tial montras, ke ili ne plu estas utilaj laŭ ekonomia vidpunkto. La novaj grandaj vendejoj estas fakte aĉetejoj, kie estas neniuj vendistoj. La virino kondiĉigita de la reklamoj iras inter du tentaj heĝoj : la objektoj kaj iliaj brilaj pakmate-

rialoj. Muziko kompletigas la hipnozon.

Pli grava estas la fakto, ke la konsumanto estas viktimo de la reklamo ĉar ĝi atakas lian animon. De la mateno ĝis la vespero li estas atakita de propagando unucela : « Vendo ! » : hejme per la gazeto, la radio, la televido ; surstrate per afiŝoj ; en la kinejo, la teatro eĉ dum la ferioj. Psikologoj studas la eblecon meti rapide pasantajn sloganojn inter la bildoj de filmoj, tiamaniere ke la okulo ne havos la tempon ilin vidi sed ke la nekonscio ilin registros. Ĉiu individuo estas je la dispono de la reklamistoj.

Ĉu la reklamo estas Ceres aŭ Moloch ? Ĉu ĝi disdonas feliĉon al la homoj aŭ ĉu ĝi formangos ilin ?

(El artikolo aperinta en « Planète »).

Vi ricevos la venontajn numerojn de Kulturaj Kajeroj nur se vi pagis vian 1967 — abonon. Restas nur Kelkaj semajnoj por reguligi konton. Rapidu.

Vi jam povas pagi vian 1968-abonon. Vidu adreson sur la kovrilpaĝo.

Listo de perantoj estas sur la lasta paĝo.

La programo de la 1968-aktivaĵoj estas preta. Petu ĝin tuj al :

Kastelo Gresillon

49 - Baugé

- Francio

(kontraŭ respondkuponon)

GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 175 jaroj naskiĝis en Venecio :

Carlo GOLDONI. — La itala verkisto reformis la italan komedion en la 18a jarcento, kio donis al li grandan famon en Eŭropo. Li elektis la temojn el la tutmonda literaturo kaj faris seriozajn temojn gajaj. Li verkis « Servisto de du mastroj », « La Mensogulo », La operoj « Scivolemaj virinoj » kaj « La Kvar Maldelikatuloj » estis verkitaj laŭ liaj tekstoj.



Antaŭ 85 jaroj naskiĝis en Oldenburg :

Karl JASPERS. — La filozofo Karl Jaspers, kiu partoprenas en la nunaj politikaj, kulturaj, religiaj problemoj, instruis unue de 1928 en la universitato de Heidelberg kaj poste, de 1948 en Bazelo. Liaj atakemaj publikaj estas multe diskutataj.



Antaŭ 70 jaroj naskiĝis en Aŭgsburg :

Bertold BRECHT. — La germano Bertold Brecht komence verkis baladojn, lidojn kaj teatraĵojn post la unua mondmilito (« Kurago-patrino »), kaj libere konigis sian poezion ribelantan kontraŭ la malfirmecon de la moderna socio. « La Dreigroschen-opero » (la Trimonerata opero) renkontis sukceson en la tuta mondo. Post restadoj en Munkeno, Danio, Sovetunio, Usono, Svisio, Brecht revenis al Orienta Berlino, kie li estas reĝisoro. Li estas rigardata unu el la plej grandaj poetoj de nia jarcento.

La misteraj revelacioj de la granda piramido de Abato Th. Moreux

ENKONDUKO

Antaŭ kelkaj jaroj, post propaganda poresperanta parolado en la urbo Bourges oni prezentis min, en stacidomo, al juna pastro, mezkreska, bruna, vigla, kun akrapidaj okuloj. Li estis Abato Th. Moreux, kiu jam estis tre konata pro siaj studoj astronomiaj. Ni interparolis dum kelkaj minutoj pri esperanto. Abato Moreux esprimis sian estimon al nia lingvo, sed mi devis adiaŭi por salti en la forirantan vagonaron.

De post tiu tempo, la Bourges'a pastro fariĝis tre fama.

Altirita de natura inklino al la astronomiaj esploroj, abato Moreux komencis siajn laborojn en la plej malfavoraj kondiĉoj, en urbo, kie estas nek universitato nek observatorio, pere de kelkaj simplaj instrumentoj, kiujn li aĉetis el sia propra poŝo. Li precipe sin dediĉis al la studo de la Suno. Li pacience observis ĝiajn makulojn, iliajn formojn, iliajn karakterojn ilian periodecon. Baldaŭ komparante siajn rezultatojn kun tiuj de la meteorologio, li konstatis, ke, ŝajnas ekzisti intima kunkligo inter la makuloj de la Suno kaj la pluvoj sur nia Tero. Tiel li, kelkajn jarojn antaŭe, per la kunperiodeco de la makuloj kaj de la pluvo, sukcesis antaŭdiri la gravegajn inundojn, kiuj okazis diversloke, sed ĉefe en Francujo, dum la jaroj 1909 kaj 1910.

La rezultatoj de la juna scienculo estis tiel signifaj, ke fine ili altiris sur lin la publikan atenton.

Kiam la turisto iras de Kairo al Giseh per ombroza vojo vualita de akcioj, li baldaŭ ekvidas, malantaŭ la ebena de verdaĵo, kiun formas la kulturitaj kampoj, la grandan flavan makulon de l'afrika dezerto. Tie komenciĝas la bruligita stepo, kaj ĉe la sojlo de l'grandega ebenaĵo, profiligas, en la brilruĝa oro de l'sunsubiro, la pintoj de la piramidoj.

La plej granda, tiu de Ĥeops, la Huvu de l'hieroglifaj inskripcioj, tiuj altiras la atenton per siaj miregigaj proporcioj.

Antaŭ tiu kolosa kunmetaĵo da blokoj, amasigitaj de armeoj da sklavoj, la spirito haltas kapita de teruro, kaj oni nevole pensas pri la celo, kiun intencis trafi la faraonoj kaj la egiptaj pastroj, kunmultigante tiujn grandegajn rokojn, regule eltrancitajn laŭ ĉiuj iliaj flankoj kaj aranĝitajn laŭ difinita geometria formo.

La gvidistoj, kiuj ne mankas en la regiono, la libroj, kiujn vi povus konsulti en la cirkonstanco, la arkeologoj, kiuj decifras per lense la hieroglifajn inskripciojn, al vi diros, ke la piramidoj estas nur funebraj monumentoj, aŭ, pli bone, la tomboj de la potencaj reĝoj de tiuj malproksimaj epokoj.

Kiom da lukso, kiom da penoj, kiom da homaj vivoj uzitaj por plidaŭrigi la memoron de egiptaj dinastioj!

Malavaraĵ riĉuloj lin helpis kaj nun Abato Moreux estas direktoro de la Observatorio en Bourges, de li fondita kaj al lia talento ŝuldata.

En Aprilo lasta, revenante vagonare de Lyon al Paris, post la nacia esperantista Kongreso, kun S-roj Chavet, de Menil kaj Voltz, mi aĉetis en la stacidoma librejo numeron de la ilustrita gazeto « *Touche à tout* ». En ĝi mi legis tre interesan artikolon de Abato Moreux pri la signifo de la Granda Piramido. Tio al mi rememorigis mian tre mallongan interparolon en la stacidomo de Bourges, kaj reveninte Parizon, mi skribis al la eminenta direktoro de l'observatorio por peti permeson, ke mi tr-aduku lian artikolon. Abato Moreux plej aŭable respondis, donis la permeson, kaj aldonis: « Mia laboro, mi preskau kuragiĝis diri mia materia laboro, malhelpas, ke mi partoprenu efektive en la propagando de Esperanto, sed mi estas feliĉa kapti la okazon, kiun vi proponas al mi, por kunhelpi morale, ho! tre mal multe, la realigon de tio, kion vi kaj viaj amikoj celadas kun tiom da sukceso ».

En la nomo de la Esperantistoj mi sendas al Abato Moreux duoblan dankesprimon: pro lia permeso kaj precipe pro lia simpatio al nia kara lingvo. Eble venos iam la tempo, kiam li mem verkos senpere siajn belajn memuarojn en Esperanto.

(Carlo Bourlet, La Revuo, 1912).

Oni komprenas la gigantajn templojn starigitajn por la hindaj Buddhoj, la ĉinajn sanktejojn de Memfis kaj Luksor; tiuj, kiuj venos post ni, kiam niaj modernaj civilizacioj estos malaperintaj, tiel bone komprenos la restojn de niaj gotikaj katedraloj, altigitaj siajn kolonarojn al la ĉielo. Tio ja estas omaĝo al la diaĵo, la esprimo de kulto, kiun ni retrovas ĉie, kie vivas la homo, en ĉiuj periodoj de la historio kaj eĉ de la prahistorio.

Sed, ke oni amasigu milojn da kubmetroj da geometrie eltrancitaj rokoj por honoro reĝon de la tero, por entombigi ŝnuritan, balzamitan kaj sekigitan mumion, ŝajnas, ke tio estas strangege eraro de l'homa malhumileco; kaj la prudento, kiu serĉas la veran kaŭzon de la grandaj entreprenoj, ne estas kontentigita, kiam arkeologo, eĉ se li estas la plej sciplena el la scienculoj, certigas, ke la piramidoj estas nur la tomboj de la faraonoj.

Kaj tamen la faktoj ŝajnas doni al tiu hipotezo realan verŝajnecon. Ĉiu piramido enhavis koridorojn, antaŭĉambrojn, funebrajn ĉambrojn, kies enirejoj estas lerte kaŝitaj de la arkitekturstoj; ili kredis, ke ili tiel certigis, ĝis ia grado, la netuŝeblecon de la tombo.

La monumento devus esti orientita laŭ la kvar ĉefpunktoj, sed, ĉu por senzorgeco, ĉu por maller-teco, tiu orientigo ne estas pli preciza, ol tiu de

nijaj sanktejoj kaj de niaj katedraloj nuntempaj, kies absido devus, laŭ la tradicio, esti ĉiam turnita al la oriento.

Hieroglifo, deĉifritaj de la Champollion'oj, kovris la internajn murtegmentojn de la koridoroj aŭ de la ĉambroj. Ili estis la entuziasmaj rakontoj de l'herooj de la mortinto. Daŭrigante lian memoron tra la venontaj jarcentoj, tiuj gloraj rakontoj de l'pasintaĵo devis certigi al lia duoblaŭ kaj al lia animo nutraĵon sufiĉan por la estonta vivo. Kaj, fakte, tiuj piramidoj, konservas ankoraŭ, en la funebraj ĉambroj, la regajn mumiojn tie lokitajn antaŭ jarcentoj.

LA SEKRETO DE L'SFINKSO

Sed, ĉu tiuj piramidoj estas konstruitaj por la unika celo utiligi, kiel tombo? Tion jesigante, niaj modernaj arkeologoj tre povas fari eraron tiom gravan, kiom farus la scienculoj, ĉar, post sesdek jarcentoj, esplorfosante la ruinojn kaj la kriptojn de niaj katedraloj, eltrovus la tombojn de niaj episkopoj aŭ de niaj reĝoj, kaj, el tiuj interesaj eltrovoj konkludus, ke niaj mirindaj monumentoj estis starigitaj por honoro iliajn restaĵojn.

En multaj okazoj la egiptaj piramidoj servis kiel tombejoj, sed ideo pli alta, laŭ nia opinio, verŝajne decidigis ilian konstruadon.

Cetere, kio povus tion pruvi, estas precize la ekzisto de la plej granda el ili, tiu de Ĥeops, konstruita dum la kvara dinastio, kiu reĝis 4.000 jarojn antaŭ la kristana ero.

Ĝia konstruo estas tre zorge farita, sed oni sur ĝi eltrovis nenian postsignon de luskripcio.

Ĝis la araba konkero, ĝi konservis surteĝaĵon el diverskoloraj ŝtonoj, tiel lerte kunmetitaj, ke oni kredus, ke la tuto estas unu sola bloko, de l'piedo ĝis la pinto. Nur post longa tempo oni eltrovis la enirejon de la koridoroj alirantaj al la internaj ĉambroj. Tiu ĉambroj, kies nombro estas, tri, ricevis fantaziajn nomojn: ĉambro de l'reĝo, ĉambro de l'reĝino, ĉambro subtera. Ili surportas nenian postsignon de dekoracioj, nenian indikon, kiu povus al ni sciigi la celon, al kiu oni destinis ilin.

Je la loko de la sarkofago, en la ĉambro de l'reĝo, staras trogo el ŝtono mirinde eltranĉita.

La granda piramido ne estas do tombo. Tiam, kielcele oni ĝin starigis? Mistero!

Cu la egiptaj pastroj, tiuj mirindaj scienculoj de la antikvo, volis fiksi en nepereigebla monumento la precizajn rezultatojn, kiujn ili amasigis pri la scienco de l'astroj kaj la sciencaj konoj de sia epoko? Eble.

Kiamaniere, tiam, ili sukcesis koni la formon de la tero kaj traesplori la profundajn de l'ĉielo? La maniero ne gravas, sed la faktoj estas, kaj, antaŭ la spiritkonfuzantaj konstatoj, antaŭ la nombraj revelacioj de la granda piramido, antaŭ la indikoj kaj la instruoj, kiujn ĝi donas pri la egipta scienco, oni komprenas la sintenadon de l'monstra sfinkso, kiu, la rigardoj turnitaj al la malproksima horizonto, devis gardi la sekretojn de la antikvaj pastroj.

LA GEOGRAFIAJ REVELACIOJ DE LA GRANDA PIRAMIDO

La unuaj revelacioj pri la karaktero de tiu giganta konstruaĵo datumas de la finigo de la XVIIIa jarcento.

Kiam la scienculoj de l'ekspedicio de Bonaparte decidis, ke ili faros la trianguladon de Egiptujo, la granda piramido al ili utilis, kiel ĉerpunkto de centra meridiano, kiun ili prenis, kiel originon de la longitudoj en la regiono.

Kaj, kia estis ilia miro, kiam ili konstatis, ke la plilongigitaj diagonaloj de la piramido tre ekzakte entenas la Delton de l'Nilo; ke la meridiano, t.e., la linio Nord-Suda pasante tra la pinto, dividas la Delton en du sektoroj rigore egalaj. Evidente tio ne povas esti aljuĝita al hazardo, tiu rezultato estas volita, kaj ni estas devigitaj konkludi, ke la konstruintoj de tiu grandega monumento estis unuarangaj geometristoj.

Sed estas pli, kaj enprofundiganta ekzameno montras, ke ili estis senegalaj geografiistoj.

El ĉiuj meridianoj de l'terglobo, tiu de la granda piramido estas la ideala meridiano, ĉar ĝi estas tiu, kiu trairas plej da kontinentoj kaj malplej da maroj. Ĝi estas, cetere ekskluzive oceana depost la Behring'a markolo, kaj, kio estas ankoraŭ pli eksterordinara, se oni ekzakte kalkulas la amplekson de la teroj, kiujn la homo povas surloĝi, troviĝas, ke tiu fama meridiano ilin disigas en du partoj rigore samareaj.

Mi estis do prava, nomante ĝin ideala, ĉar ĝi estas la sola, kiu estas bazita sur la naturo: la sola, sekve, kiu estas vere pravigebla. Se nun ni desegnas cirklon paralelan je la ekvatoro kaj pasantan tra la trideka grado de la latitudo, ni povas konstati, ke tiu cirklo estas tiu, kiu entenas plej da kontinenta amplekso.

Nu! la latitudo de la pinto de la piramido al ĝi proksimiĝas mirinde ĉar ĝia valoro estas 29° 58' 51". Oni kredis unue je tre malgranda eraro en la determino, sed mi tion ne opinias, kaj jen kial:

Se la arkitektursto kalkulas la lokon de la monumento tiamaniere, ke observanto lokita ĉe l'piedo de l'konstruaĵo vidas la ĉielan poluson je alto da 30 gradoj ekzakte, li devus atenti pri fenomeno konita sub la nomo atmosfera refrakto. Kaŭze de la denseco de la aeraj tavoloj, lumradio, eniranta en nian atmosferon, estas deviita de sia vojo; ni do ne vidas ĝin en ĝia reala loko. Kaj, en la okazo, kiu nin okupas, la kalkulo montras, ke la mezo de la piramido devas, teorie, esti: 29° 58' 51" 22. La du nombroj estas do identaj kun ekarto de 22 centonoj de sekundo: tiu ekarto estas sensignifa kaj la kunakordo ne povas esti pli perfekta.

Supoze, ke ni staras antaŭ hazardaj koincidoj, oni devas konfesi, ke ili estas almenaŭ rimarkindaj, kaj ankoraŭ multaj, ĝis kiam ili estos elĉerpitaj.

La oriento de la piramidoj, mi tion jam rimarkis, ĉiam estas nur tre proksimume ĝusta. Ne estas same pri la oriento de la piramido de Ĥeops. La kvar lateroj, formantaj ĝian bazon, rigardas tre ekzakte al la kvar ĉerpunktoj, ĉar la ekarto estas apenaŭ 4 minutoj kaj duono. Tiu ekzakteco, vere eksterordinara, kiam oni pensas pri la malfacilecoj, kiujn ni renkontas por determini la orientojn de konstruaĵo, eĉ nuntempe, kun helpo de la kompasoj, montras, ke la arkitekturstoj devis uzi astronomiajn rimedojn, liveritajn de scienco tre progresinta. Ĉi tie, la sistemo de la hazardaj koincidoj ne estas akceptebla; oni devas, vole ne vole, ĝin konsentiti.

Daŭrigota.

Oficiala Komunikajo de la Akademio

Petite de la Germana Esperanto-Asocio (DEB) « solvi la problemon de la pasivaj participoj laŭ Zamenhof » kaj de la unuana Komitato de U.E.A. « kiel eble plej baldaŭ » difini tiun solvon ;

Samtempe konsultite de la Unuiĝo Franca por Esperanto (U.E.F.) kaj de la Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (E.U.G.I.) pri la ĝusta senco de kvar tipaj frazoj, kiaj povas troviĝi en diplomatia, jura aŭ politika dokumento, nome :

1. « Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970 » = do la garantiantoj estos kvitaj :

a) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon ;

b) nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon,

2. « Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo » =

a) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo ;

b) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

3. « Ni asertas, ke la aŭtomobilo de sro X estis efektive riparata la lastan semajnon » =

a) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭto ;

b) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon.

4. « Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio » =

a) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio ;

b) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

La Akademio, per 26 voĉoj el 31 voĉdonintoj (kaj 6 kromaj blankaj voĉdoniloj) decidis kaj deklaras, ke en ĉiu el tiuj frazoj nur la senco A estas konforma al la tradicia lingvouzo de Zamenhof, kaj ke ĉia alispeca interpreto estas neoficiala. Tiu decido cetere nur konfirmas kaj kompletigas la rezulton de la voĉdono farita de la Akademio en Julio 1965 pri la senco de la pasivaj participoj en la Fundamento.

Ĉia eblo de dusenco en la uzo de tiuj participoj estas do forigita per ĉi tiu decido kaj ni esperas, ke la aŭtoroj de lernolibroj de nun konsideros la ĉisuprajn modelajn frazojn en la senco aprobita de la Akademio.

La 25-an de Novembro 1967.

G. Waringhien, *Prezidanto*.

P. Neergaard, A.D. Atanasov, *Vicprezidantoj*.

R. Bernard, *Sekretario*.

D.B. Gregor, *Direktoro de la Gramatika Sekcio*.

Stranga aventuro


La satelitoj similas la homojn. Ili kelkfoje malsaniĝas aŭ suferas akcidentojn. Kompreneble ankaŭ ne ŝvelas en la kosmo kliniko por satelitoj. Sed ekzistas kuracistoj kiuj, de la Tero, aŭskultumas, kuracas kaj ofte resaniĝas la malsanajn spacmaŝinojn.

Antaŭ ne longe, dum rondflugado ĉirkaŭ la Luno, la satelito « Lunar » subite ĉesis normale funkcii. La fotoj de li senditaj al la Tero ne plu estis klaraj. Kuracistoj estis vokitaj. Ili aŭskultumis tricent mil kilometrojn for de la malsanulo. Ili diagnozis : « Lunar suferas pro vaporajo etendiĝinta sur la objektiloj ».

Estis necese operacii, t.e. provizore fermi operakulon, kaj ekfunkcigi termikan radiatoron, kiu, ŝirmanta la objektilon kontraŭ la spac-malvarmo, forigos la perturban vaporajn. Tion oni faris.

La kirurgoj eĉ turnis la sateliton, tiamaniere ke ĝi prezentis al la suno sian dorson, same kiel oni kuŝas la malsanulon sur la operaci-tablo en la plej taŭga pozicio.

La operacio de la satelito sukcesis. La fotoj, kiujn ĝi nun sendas al la Tero estas denove klaraj. Lunar resaniĝis.



El verkaro de Imri Sarkadi, hungara verkisto

Tradukis Ladislav Tihanyi

KION ANKORAŬ ?

Laŭkute, Maria vekigis iom malfrue, fuŝe sinvestis, kuris ĝis la tramhaltejo, denove kuris tra la ŝtuparo ĝis la laborĉambro. Vanaj klopodoj! Dek minutojn malfruis la juna virino! Sed, kvankam pro ekscito kaj kuro ŝi fariĝis ruĝa, kiel rozo, neniu inter la kolegoj atentis pri ŝi. Neniu, ĝis nun, ŝercis ŝin.

Tuj sidanta ĉe sia skribotablo, ŝi ĥorspiradis la lacecon, rimarkis la vanecon de sia kurlklopodo, kaj bedaŭris la nemanĝitan duan rostitan panpecon, kaj la nepreparitan paŭzmanĝaĵon. Ba! Jam hejme, ŝi antaŭvidis sin vizitanta la kontorbufedon, manĝanta tie unu aŭ du sandviĉojn, kaj primokanta sian apetiton. Ĉu la edzo ne ĉiam diras « Vi estas tiel manĝema, kiel anaso », kiam, hejme, post la manĝo, la juna virino lasas teleron tute pura.

Post la naŭa vizitis ŝian laborĉambron Sro Vince el la sekretariejo. La virino jam atendis lin, kaj sentis lian mankon. Ŝi ridetadis en si kaj pensis : « Certe, li ne venas pli frue pro sinĝeno, kaj vole prokrastas la viziton. Ja, kute, li ŝatas ekaperi jam de la duono antaŭ la naŭa.

— Bonan matenon.

— Bonan matenon.

La viro apudiras ŝian tablon, kaj per grandaj okuloj rigardas al ŝi : « Kiel vi dormis eĉ Maria ? » — « Dankon, bone... ĉu vi ? » — « Tion poste. Sed, kion vi sonĝis ? » — « Ha, kion ? jen, tion mi forgesis. » — « Do, vi sonĝis pri mi, ĉar prefere vi forgesas min ! » — « Ho, jes, jes, eĉ rememori mi ne scias fari... momenton... jam mi forgesis... tamen, eble, mi sonĝis pri vi ».

Grimacmove, ŝi komencis serĉi ion sur la tablo, inter la paperoj, kaj interne ŝi amuziĝis grande : « Ĉu ne estas carma tiu-ĉi afero ? Ĉu ne estas ĉiele bona tiu laborundigiĝo ? Ĉi-tie pasas la tempo centfoje pli bone ol hejme, prizorgante la dommastrumadon. Ĉi-tie estas Sro Vince. Ĉu unika viro ? Li amindumas tiel kare. Sub liaj ŝercoj sentebla estas la seriozezo. Tamen, estas ŝercoj, ĉar li tion akcentas. » — « Maria, mia kara, grumbli la sinjoro, ne petoladu, mi bezonas vin... ĉu vi ne sentokomprenas ? tio ne estas ŝerco... » — « Ho, iom ektimigi la virino, ŝajnas, ke li legis miajn antaŭajn pensojn ! » — « Nu, bone-bone, ŝi diris rapide. Nun, lasu min sola, ĉar mi devas labori ». Ŝi faris severan mimikon kaj por pli gravigi sian mienon surmetis okulvitrojn kun nigraj muntajoj, cetero tute ne necesaj por ŝia vido ! Eĉ la kuracisto malkonsilis ilin. Tamen, laŭ ŝia opinio, ŝi devas uzi por doni pli interesan formon al sia vizitaĵo, pli da brilo al la okuloj, kaj tiamaniere reliefigi sian hirtan nigrakaran kapon. Kun mieno ŝajne modesta de kato atendanta la karesadon, ŝi murmuretis : « Kara Sro Vince, lasu min sola, ĉar oni mortbato min se hodiaŭ, antaŭtagmeze, mi ne finaranĝos tiujn-ĉi aktojn » kaj ŝi montris sur sia tablo, paperamason. « Maria, Marieta, sciigu certe, ke mi amfreniziĝis de vi... » — « Nu, bone, mi scias, sed kion mi povas fari pri tio ? » — « Ĉu mi klarigos kion fari ? » — « Ne klarigu, iru for, ĉar mi tuĝ dorsenbato vin ».

Sinjoro Vince foriris, Maria tikle ridetis en si, kaj ŝi estis feliĉa. Satinda knabo. Carma knabo. Stultegulo. Tamen, ne stulta, ĉar estas io en liaj okuloj... vere io estas. Kaj ekskluzive ŝi plaĉas al li. Ne la tri dek aliaj

koleginoj de la kontoro, nur ŝi. Ŝi revis pro kiu plaĉus al li unu el la tri dek aliaj ? Ho, scii pri tio !

Dum la sama tago, almenaŭ trifoje aperis Sro Vince. Eĉ ĉe tagmanĝo, li sidis tute apude, kaj murmuretis al ŝi. Kelkfoje tiel friponete, ke oni povus timi aliulan aŭdon. — « Maria, dum duonhoro mi nur rigardus vin... la fleksojn de via kokso... » — « Bonvolu, ne priskribi detale ĉar... » Ŝi ridis kun esprimbalanca kapo

Vespere, kiam, hejme, ŝi forlasis la banĉambron kaj kombis sin antaŭ la spegulo, subite ekrimarkis ŝia edzo : « Maria, vi dikigias » — « Ĉu vere ? Ĵi ? » — « Vere, vi estas tro manĝema. » — « Ne estu impertinenta, ĉar... » — « Mi ne estas impertinenta, sed rigardu vi mem. Sur via kokso elformiĝas la graso ». Kaj ridis la impertinentulo pri la bona asimilo. « Ĉu vere ? pensis Maria. Se oni atenteme observas, vere, mi iomete dikigias en la kokso, sed tion li ne devas diri ». Maria ruĝetiĝis, terure furioziĝis, eĉ ne plu alparolis ŝian edzon. Kolereme, ŝi turnis la dorson al li, kiam li karesis sian brakon. « Impertinenta, ŝi pensis, kaj se mi ne plu plaĉas al li, mi ankoraŭ havus iun al kiu mi plaĉas ».

Kiam la edzo ĉesis karesi ŝin kaj estingiĝis la lumon, plue ŝi furioziĝis. Nu, ja. Do... por li, mi maljuniga. Frappe, en ŝian cerbon aperis la timiga fantomo de ŝia dudek kvinjaraĝo. Poste, li ĉagrenos min pri tio. Pfi ! Kion ankoraŭ ?

Senpacience, ŝi atendis la venontan tagon por renkontiĝi kun Sro Vince. « Kiu ajn mi iariĝu, mi priaŭskultos lin ». Sed, kiel. De tiom longe Sro Vince diras tiujn « ŝercaĵojn », ke estas duba respondi ilin, alimaniere ol ĝis nun. Kion fari por ĝi lin serioza ? Ege ŝi konfuziĝis, certe ruĝiĝis kiam, tra la pordo, aperis Sro Vince, ĉirkaŭ la naŭa. « Kion vi sonĝis Maria ? » — « Ho, Vince, imagu, mi sonĝis pri vi. Jen, mi estas tute konfuza klarigi tion... » — « Kion do ? » — « Nu, kiel komenci... Terura sonĝo ĝi estis. Mi sonĝis, ke fojon, fojon, mi estis diranta al vi : Kara Vince... nun mi konsentas !... kaj, tiam, vi nur staris kaj diris aforismon pri la senmorteco de la majskarabato ! » Li rigardis ŝin per grandaj okuloj : « Ĉu vi friponadas, Mariño ? » Ŝi nur ridis en si : « La stulta... la stultulo... ne havas la kuragon kredi » kaj de la sekventa minuto, ŝi prenis la du brakojn de Sro Vince. — « Ĉi, Maria ? » — « Atentu ! » Ŝi volis liberigi sin. — « Oni povus eniri ! » kaj, kiam la knabo Vince atingis ŝian kokson, timege ŝi forsaltis. « Ne ŝercu ! » Ŝi sentis la tremojn de siaj nervoj. Ne pro tio, ke io povas okazi, sed, subite, ŝi rekonsciĝis pri la fakto, ke vere ŝi iom dikigias. Pro Dio, ŝi ne faru, ke... en tiu-ĉi ne gracia formo... ĉar en vesto, li nenion rimarkas, sed ŝi ne perdus la menson por, ke li pensu en li mem... Terure !... Ŝi kurbigis, kun fingroj pretaj por skrapoj se li denove alproksimiĝus.

Kiam li foriris, ŝi denove ridis en si. Ho, ho, knabo ! Atendu iomete. Kion ankoraŭ ! Vi rigardadus mian kusenodikan kokson dum duonhoro, ĉu ne ?... Kion ankoraŭ ?

Ŝi decidis, ke nun ĉio estas finita. « Tamen, mi abdikos la tagmanĝon, kaj malfruan eŭliiĝon. Ĉiutage, mi naĝos, kaj antaŭmanĝo ne ekzistos ». Sed, ĉirkaŭ la deknua, ŝi malpalkis la antaŭmanĝon : ĉar ĝi jam estas ĉi-tie, mi ne povas hejmen reporti... sed, de morgaŭ... »

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

(komenciĝinta en la antaŭa numero)

Unua problemo

En la ĉisubaj frazoj, kelkaj estas korektaj,, kelkaj ne korektaj. Bonvolu korekti la erarojn (gramatikajn). Ĉiu eraro ĝuste korektita valoras po 2 poentoj, sed ĉiu eraro aldonita forprenos po 1 poento.

- 1) Li venas el Parizo.
- 2) La domo, kies tegmento mi vidas.
- 3) Edzino pli elverŝas kun funelo, ol edzo enverŝas kun sitelo.
- 4) Mano dekstra ne scias, kio faras la maldekstran.
- 5) Dorloti serpenton sur ŝia brusto.
- 6) La laboristo petas la ĉefon pli altigi sian salajron.
- 7) Kio estas bona por vi, estas bona por mi.
- 8) Kun kiu vi festas, tiu vi estas.
- 9) Fremda animo estas abismo sen limoj.
- 10) Por fremda koro ne ekzistas esploro.

Dua problemo

Litera enigmo : la solvo konsistas el 90 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj per la sekvantaj ŝlosilvortoj :

- 8 7 1 9 11 36 5 24 18 22 = baĭkana lando.
 6 29 15 25 12 31 54 39 = tabaka veneno.
 14 13 3 15 41 73 20 55 59 = stona ĉerko.
 26 27 65 37 35 16 61 = nomo de monato.
 84 2 76 48 23 10 68 80 = nomo de tago.
 17 48 32 56 86 44 38 45 82 = alpa floro.
 15 42 33 66 19 6 47 11 15 9 = granda festo.
 58 53 21 67 54 78 79 22 = orientazia lando.
 4 52 68 49 50 64 74 75 76 72 25 = eŭropa maro.
 43 51 40 90 88 89 = denove diri aŭ fari.
 14 77 2 60 30 62 39 = reĝa bastono.
 63 83 69 24 71 36 10 1 85 41 = favorrajto.
 46 57 56 87 81 59 = bulba floro.
 70 17 3 32 34 5 28 61 = malsupra domparto.
 1 90 = interesa aserto de la franca scienculo
 J.B.L. d'Alembert (1717-1783) pri kelkaj landoj de Eŭropo.

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvo de la krucvortoj

Horizontale : kuratoro, orumi, manipuli, en ;
 koraldigo ; odo, agoj, aniema, asimilad.
 Vertikale : komedi, urani ; as, run ; gumi, amiko ; em, tipo ; ami, urogal, rulado, ilo.

Nova problemo

Tiu rugbeo-teamo venkis. Sed la bildo entenas ses erarojn. Trovu ilin.




GRAMATIKO PER BONHUMORO

« **Por** : prepozicio sekviganta substantivon, ad-
verbon aŭ infinitivon kaj esprimanta : **celon**,
destinon.

Pro : prepozicio montranta la **kaŭzon**, la **mot-
ivon** de ago. »

(Plena Vortaro).



— Mi lasis mian barbon kreski por esti origina-
la ; mi konservas ĝin pro la malvarmo.



— Kial vi revenas, sinjoro ?
— Pro tio, ke vi ne respondis kiam mi skribis
por peti ĉu vi preferas pagi viajn impostojn
per mono aŭ per naturaĵoj.



— Ni faris grandan laboron por retrovi liberecon
sed ni ne povos ĝui ĝin pro la pluvo.

21 jult - 3 aŭt VEA - semin.
3-10 aŭt Madrid 10-17 Saragosa?

16-23 aŭt STELO dix
→ ? sept. Toulon

Pureshi
25 kolo Sommer
Pauze

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (12 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczy, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO 90 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centri-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponaro :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo